# ?eestas Díaz-Canel la ceremonion okaze de la nacia ribela tago



**Foto: PL**

Havano, jul 19 (RHK) La unua sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo kaj Prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel, prezidis ?i-mardon la kulturan politikan akton por la 69-a datreveno de la sturmo kontra? la Moncada kaj Carlos Manuel de Céspedes, en la Supera Lernejo de la Partio 'Ñico López', en Havano.

En sia Tviter-konto, la eminentulo precizigis, ke kelkajn tagojn anta? tiu dato, "kune kun gvidantoj, oficistoj kaj laboristoj de la Komunista Partio de Kubo (PCC), ni festas tiun epopeon, kiu instruis nin igi malsukcesojn en venkojn".

Proksime de la festoj por la  Nacia Ribela Tago (26-an de julio), laboristoj de la Centra Komitato de la KP ricevis el la manoj de la kuba prezidento la karton, kiu akreditas ilin kiel aktivulojn de la organizo.

En la sama socia reto, la Kuba Prezidanteco konstatis, ke anka? aliaj homoj kaj departementoj estis agnoskitaj pro siaj produktivaj kontribuoj.

En la ceremonio partoprenis la sekretario pri Organizo partia, Roberto Morales Ojeda, kaj la helpa strukturo.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/293953-ceestas-diaz-canel-la-ceremonion-okaze-de-la-nacia-ribela-tago

Radio Habana Cuba